

V-4252/40 (1947) obopn3

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 500

JUNIO 1947

LA "EPOKO" LIBROJ

Serio de interesaj romanoj por la distra horo

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.
El la angla tradukis "Etulo".
183 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** Francisko Molnár.
El la hungara tradukis L. Spierer.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.
El la angla tradukis G. Badash.
185 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells.
El la angla tradukis E. W. Amos.
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.
181 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.
El la franca tradukis Prof. J. Beau.
184 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 7 respondkuponoj afrankite.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi.
El la hungara tradukis L. Spierer.
148 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj afrankite.
8. **La Virineto en Bluo kaj aliaj rakontoj.**
Originale verkitaj de Mason Stuttard.
150 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 13 respondkuponoj afrankite.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondokupono por ĉiu duo da vortoj.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Brita oficejo deziras korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

Italingvo-perfektigemuloj plenusukcesoj per individua koresponda lecionaro. Informojn kontraŭ postresponde-kupono. Corrado Cerri, Casale Litta (Varese), Italujo.

Instituto de Administrado Trafika: Vic-prezidanto deziras korespondi kun interesatoj pri transportaj temoj. Bonvole skribu al BM/DNJJ, London, W.C.1, Anglujo.

S-ro F. S. Almada, Banco do Brasil, Santos, Brazilo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

Al sinjoro N. Wooding, delegito en Leicester, Anglujo, tre kore dankas la gefratoj de Lionel Sturmer, mortinta en tiu urbo la 18an de Decembro 1946, pro grandaj servoj pri liaj aferoj postmortaj.

Komercesto 35-jara, nefilatelisto, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Gerhard Schulz, (23) Bremen-St. Magnus, Lesumer Heerstr. 34, Germanujo.

Okjara knabino deziras korespondi kun geknaboj. Adreso: Italina Stepanova, Frankfurt am Main, Kaiser-Sigmundstr. 36, Germanujo.

Redaktoro deziras korespondi kun ĵurnalistoj kaj verkistoj el tuta mondo. Adreso: Peter Steinbach, Redaktoro de Frankfurter Neue Presse, Germanujo.

Letervespero. La 12an de Julio 1947 la bonhumoraj membroj de Flandrema Grupo Esperantista atendas multajn poŝtkartojn kaj leterojn. Respondo garantiata. Adreso: Carnotstraat 70, Antwerpen, Belgio.

Psika esploro kaj Spiritismo. Raportoj petataj dum kunvenoj ĉe Berna Kongreso. Skribu al Nora Holmes, 38 Fillebrook Road, London, E.11, Anglujo.

Londona Esperanto-Spiritista Societo petas informon pri spiritismo ĉie ajn por pravi utilecon de Esperanto al grava gazeto. Skribu al Nora Holmes, 38 Fillebrook Road, London, E.11, Anglujo.

Mekanikisto deziras korespondi precipe pri aŭtomatnoroj. Skribu al J. Combe, Vic-le-Comte (Puy-de-Dôme), Francujo.

Mi kolektas poŝtkartojn (ankaŭ en kovertoj) el la tuta mondo. Al ĉiu mi respondos. F-ino Miluše Vránová, oĉistino, Zelizy 69, p. Liběchov de Melnik, Ĉeĥoslovakujo.

Ekzaktajn informojn pri psikologio kaj psikoteknikaj institutoj el ĉiuj landoj tre urĝe bezonas Zdenek Tubl, Praha VII, Pristavni 27, Ĉeĥoslovakujo.

30 gekursanoj (kelkaj infanoj) deziras korespondi. Esperanta Grupo, Miltenberg am Main, Hauptstr. 288, Bayern, Germanujo, U.S. Zone.

Apcher, professeur, Lycée, Meknes, Maroko, deziras aĉeti aŭ pruntepreni "Plenan Gramatikon" de Kalocsay-Waringhien.

15 gejunuloj, 15-20 jaraĵoj, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj. Skribu multnombre al Milan Novák, Hradec Králové 6, Ĉeĥoslovakujo. Certa respondo.

La apoteko en tutmondo. Deziras korespondi kun farmacistoj en tuta mondo pri ĉi tiu temo kaj petas informojn, ilustraĵojn k.t.p. apotekisto K. Heise, (13b) München 13, Hohenzollernstr. 83/1, Germanujo.

Letervesperon aranĝos bonhumora rondeto la 15an de Septembro. Skribu amase al Horchateria Jaime, Ruzafa 7, Valencia, Hispanujo. Respondo garantiata.

Deziras korespondi kun la tuta mondo S-ro Amado Pons, Sicilia 217, I, 2a, Barcelona, Hispanujo. Nepre respondos.

Letervesperon aranĝos fine de la somero Esperanto-Klubo en Tábor, Jeronymova str. 1984, Ĉeĥoslovakujo. Poŝtkartoj, leteroj atendataj; respondoj garantiataj, ĉio filatelie.

Deziras korespondi (Esperante aŭ germane) kun Esperantistoj en la tuta mondo, Fakinstruisto Armin Schorcht, Hannover-Hhsn., Clausthaler Weg 10, Germanujo.

Mariano Casado, Sta Barbara 8, Madrid, Hispanujo petas pardonon al siaj amikoj kaj korespondantoj pro sia prokrasto respondi. Li edziĝos la 2an de Junio kaj estas tre okupata pro la preparoj. Li respondos poste al ĉiu. Koran dankon!

Industria ĥemia doktoro deziras korespondi kun inĝeniero faskperta pri plastikaj materialoj. Skribu al S-ro José Andreu, Moratin 21, Valencia, Hispanujo.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj Michl Ehbauer, Herzog Albrechtstr. 6, München-Obermenzing, Germanujo.

"Veda" vegetara restoracio kaj loĝdomo, 133 Drummond Street, London, N.W.1. Apud Euston stacidomo; tel. Euston 5130. Malferma ĉiutage (ankaŭ Dimanĉoj) 7 atm.-9 ptm. Komforta kaj internacia atmosfero.

Zankai Daniel, Esztergom, Basa-str. 15, Hungarujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Mi volas fondi Esperantan grupon inter la membroj de komunuma asocio kaj bezonas leterojn k.t.p. kiel propagandilojn. G. A. Hartley, 37 Handsworth Road, Sheffield, Anglujo.

Antaŭ kaj dum la milito mi perdis ĉion. Mi nun serĉas miajn iamajn gekorespondantojn, ankaŭ novajn. Gerhard Klau, (1) Berlin-Zehlendorf 1, Usona Sektoro, Seehofstrasse 24, Postfach 56. Membro de UEA.

Willi Nitsch, (22a) Rheinhausen, Rheingoldstr. 33, Germanujo, Brita Zono, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos.

Deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun ĉiuj landoj S-ro Knud Hansen, Karsgade 47-IV, København N., Danlando.

Sakistoj. Esperanto-fako de I.C.C.A. organizas korespondturnirojn. Informojn sendos D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.

Fervore deziras korespondi junaj Parizaj fervojistoj! Skribu: Duffaud, 46 Rue Paix, Vincennes (Seine), Francujo.

Feriu en Norvegujo

Gesamideanoj, ni invitas vin al unusemajna ferio, de la 13a ĝis la 20a Aŭgusto, en Lofthus, Hardanger.

Jen vi havas okazon vidi la plej belan regionon en okcidenta Norvegujo. La restadejo situas kiel perlo ĉe la bela Hardangerfjordo, unu el tiuj fjordoj kiuj estas tiel tipaj por Norvegujo. Kaj ĉirkaŭ ĉi tiu perlo leviĝas la montaro kun eterna glaciejo kaj altaj akvofaloj. Venu vidi per propraj okuloj!

Petu prospekton kaj anoncon vin tuj, se vi deziras kunesti; loko por nur 50 personoj. Prezo: proks. 120 norvegaj kronoj por la tuta restado, ekskursoj inkluzive.

Adreso: 1 Vestlandets Krets av Norsk Esperanto-Forbund, Boks 132, Haugesund, Norvegujo.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

40a JARO N-ro 500 (6)
JUNIO 1947

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB
ESPERANTO, PALAIS WILSON
GENÈVE, SVISLANDO

**OFICIALA ORGANO
DE UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO
(IEL kaj UEA kunigitaj)**

Eldonejo
(al kiu oni sendu ĉion pri
reklamoj kaj administrado)
HERONSGATE, RICKMANSWORTH
HERTS., ANGLUJO

Jara abono : 7 ŝil. 6 pencej
(kun membreco kaj jarlibro
10 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo	-	45 anglaj
$\frac{1}{2}$ paĝo	-	50 ŝil. anglaj
$\frac{1}{4}$ paĝo	-	25 ŝil. anglaj
$\frac{1}{8}$ paĝo	-	12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencej por unu vorto aŭ
1 int. respondkuponon por ĉiu
duo da vortoj

Eldonnumero :
7,000

Legantoj en 65 landoj

FOR LA PESIMISMON!

Ĉiu poridea agado devas suferi la fluon de la tempo kaj de la ŝanĝanta sinteno de la homoj. Ideo kiu fariĝas movado, devas batali kontraŭ malamikoj pri kies ekzisto la propraj anoj pensas nur malofte. Estas la eksteraj malamikoj, estas la internaj, kaj estas la homa malsufiĉeco en ĉiuj siaj formoj. Estas pruvo pri malkono, nei tiajn realaĵojn. Komparo kaj rezonado devus anstataŭi la tendencon, rigardi ĉion per okuloj de pesimisto, kiu vidas ĉion nigre kaj kiu kapablas infekti la kunhomojn.

Ili abundas inter ni, la pesimistoj kaj al ili direktiĝas tiu ĉi parolo. Vi kritikas tion aŭ alion, vi grumbas ke oni ne sufiĉe entreprenas en tiu ĉi aŭ en alia afero de la homa agado, vi plendas pri la alta kotizo kaj tiel plu. Ĉu vi jam analizis trankvile la evoluon de la mondo depost la apero de Esperanto kaj la radikalajn ŝanĝojn kiujn kaŭzis la du militoj, kies terurigitaj samtempuloj ni estis? Ĉu vi memoras kaj se vi ne ankoraŭ partoprenis la movadon, ĉu vi studis la efikon de la lingva skismo, kiun ni devis finbatali? Ĉu vi konas la internajn kverelojn pri la organizo, pri aro da esperantismaj problemoj ne solveblaj per simpla diktado, sed per diskutado kaj konvinkigo? Ĉu vi partoprenis la zorgojn de la kondukantoj, trovi la rimedojn esti pretaj en taŭga momento por ion entrepreni? Ne, vi eble ne konas tion, vi nur vidas la vojon irotan ankoraŭ.

Al vi pesimismulo ni volas montri la veran situacion. Unue konstatu ke nia ideo ne dronis en la maro de la ignoro kaj de la forgeso. Spite la nuligo de nia movado en gravaj landoj, kiujn ni ne citas, spite la ŝanĝitaj kondiĉoj, Esperanto vivas kaj reprenas sian lokon. Ĝojiga estas la reveno de iam fervoraj samideanoj el la idea tombejo, promesiga estas la entuziasmo de homoj kiuj dum jardekoj devis silenti, suferi, sangadi por nia ideo. Ilin aŭskultu, Sinjoro pesimisto, lernu de ilia fido kaj kredo.

Kaj eĉ se ne ĉio estas bona en la movado, ĉu la partopreno en ĝi ne estas por vi granda gajno spirita? Ĉu la rilatoj kun samideanoj en aliaj landoj, la amikeco kun homoj, kiuj sen Esperanto vi neniam estu konatigintaj, ĉu tio ne meritas ke vi rigardu la situacion per rozkoloraj okulvitroj kaj ne per nigraj? Tiu ĉi efektiva aktivajo en la bilanco de nia agado estu antaŭ viaj okuloj kaj tiam vi diru al vi: "Jes, for la pesimismon, ni laboras por bona afero kiu bezonas sian tempon por venki!"

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Brazilo

La Urbeŝtaro de Belo Horizonte en ŝtato Minas Gerais, aprobis proponon de la tiea Esperantistaro, ke okaze de la 50-jara jubileo de la urbo—tio estos en la 17a de Decembro ĉi-jare—oni eldonu oficialan gvidlibron pri la urbo, kun fotografiaĵoj, kaj ke oni nomu placon *Placo Esperanto*. Sur tiu placo la samideanoj intencas starigi monumenton memore al D-ro Zamenhof.

Multnombra alskribo kun esprimoj de danko estus tre efika. Oni skribu al: Ao Sr. Prefeito de Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

Wilson Veadó

Bulgarujo

Oficiala Poŝtmarko kun teksto en Esperanto

Por la 60-jara jubileo de nia lingvo, la bulgara poŝtadministracio decidis eldoni poŝtmarkon. Ĝi valoras 30 levojn kaj pagas la afrankon de simpla letero al eksterlando. La eldonkvanto estas limigata. Oni povas mendi tiajn poŝtmarkojn ĉe Bulgara Esperanto Asocio, redakcio de Internacia Kulturo, str. Graf Ignatiev 2, Sofia. Prezo, por du ekzempleroj 3 stampitajn respondkupojn internaciajn, por dek, 15 respondkuponoj. Aldonu por afranko kaj rekomendo du pliajn kuponojn. Se oni deziras ke la letero estu afrankata per la jubilea PM oni aldonu 3 respondkuponojn.

(Laŭ *Internacia Kulturo* de Aprilo 1947)

Ĉeĥoslovakujo

Somera Esperanto-Lernejo

De la 19a de julio ĝis la 2a de Aŭgusto 1947 ree okazos somera esperanto-lernejo en Doksy apud Macha lego. Estas antaŭvidata jenaj aranĝoj:

Historia komedio de la fama verkisto ĉeĥa Vrchlicky "Nokto en Karlův Týn" sukcese ludita en Praha dum la 13-a Kongreso de Esperanto, plie kinoteatro, arta muzikvespero, dancoj, somera karnavalo, ekskursoj, sporto, banado, bivaka fajro kun kantado k.t.p. La instruon parton gvidos D-ro A. Pitlik, Esp.-lektoro ĉe la Teknika Universitato en Praha.

Eksterlandaj gastoj tre kore bonvenataj. Salutkartoj por letervespero petataj. Informojn oni petu de Václav Špur, disponanto de ŝparkaso, Doksy ĉe Macha lago, Ĉeĥoslovakio.

Danujo

Store Heddinge montras la vojon!

Laŭ iniciato de instruisto Hans Dalgaard oni en la popol-lernejo de St. Heddinge enkondukis Esperanton kiel devigan fakon komence de 1-a de Aprilo, 1947.

La nerekta kaŭzo estas, ke multaj gepatroj lastjare protestis kontraŭ plua instruado de la germana lingvo. H. Dalgaard lerte profitis tiun situacion por decidoj favoraj al Esperanto. La urbestro subtenas la ideon, dirante ke la popol-lernejo bezonas fakojn, kiuj povas igi ĝin alloga kompare kun la mez-lernejo.

La decido validas por la sesa kaj sepa lernejaraj, respektive 2 kaj 3 lecionojn ĉiusemajne.

En *Østsjælands Folkeblad* S-ino F. Munk-Andersen, urbeŝtrano, skribis tre interesan artikolon favore al Esperanto el vidpunkto pacifista. Ŝi ĉerpis bonan materialon el la Esperanto-rubriko de la Sveda pacifista gazeto *Mellanfolkligt Samarbete*.

P. Thorsen

Francujo

Amika Internacia Renkonto

De la 13-22 de julio okazas amika renkonto internacia en Angers. La programo enhavas paroladojn, filmo-prezentado, vizito de la urbaj vidindaĵoj, muzeoj, fabrikoj, ekskursoj kun gustumado de la famaj "Vins d'Anjou"—Andegava vino—k.t.p.

Restado estas malmultekosta: po 150 ĝis 200 fr. frankoj ĉiutage. Kotizo 150 fr. Ekskursoj aparte pagotaj.

Samideanoj ironantaj Bernon al la nunjara kongreso trapasantaj Angeron, antaŭvidu restadon.

Pri informoj skribu al F-ino Nouais, 28 Bd. Descazeaux, Angers.

Nov-Zelando

Ĉe ni la nova jaro komenciĝis tre feliĉe per la malfermo de la 12a Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Auckland.

Tio estis la unua Kongreso post Januaro 1941, kaj por multaj Esperantistoj la unua dum la vivo. Por ĉiuj ĝi estis sukcesa kaj memevidente feliĉiga travivaĵo.


Dum la kunsidoj, la nova Ĉefdelegito, S-ro Brendon Clark, anoncis longan liston de novaj delegitoj.

La kongresanoj faris ekskurson al la vidindaĵoj arbaro kaj filikaro de Waitakere.

Germanujo

En 1934 la sekreta ŝtatpolico (Gestapo) venigis antaŭ sin la estron de la tiam Esperanto-societo, en Augsburg, S-ro Karlo Gerber, kaj postulis la nuligon de la societo kaj de ĝia biblioteko, kaj ĉesigon de lia privata Esperanto-korespondado. Antaŭvidante domtraserĉon—kiu efektive poste okazis—li kaŝis la verdan standardon de la societo. Tiu estis donacita al la grupo okaze de kongreso en Augsburg en 1910.

Feliĉe do la standardo saviĝis kaj nun estas denove disponebla por festaj okazoj. Ni aldonas fotografajon de la standardo.



Unueco

La 12-13 Aprilon okazis en Frankfurt/M interzona konferenco de delegitoj de 33 asocioj kaj grupoj en la 3 okcidentaj zonoj. La rezulto estas starigo de nova asocio, Germana Esperanto-Asocio, en kiu unuiĝis la neŭtralaj kaj laboristendencaj movadoj. La asocio mem estas neŭtrala pri religio, politiko kaj raso, sed estas nepre kontraŭ-fasisma kaj pacisma. Prezidanto estas D-ro S. Ziegler, dua Prezidanto, S-ro P. Schalmay, kaj unua Sekretario, S-ro Felix Epstein.

Nederlando

Rezolucio

La XIV-a Kongreso de la Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia" :

konsiderante, ke la evoluo sur ekonomia, kultura kaj politika terenoj nepre postulas internaciajn kunlaboradon kaj kunordigon :

opiniante, ke la lingvodiverseco estas grava malhelpo por libera evoluo de la internaciaj rilatoj kaj ke la uzado de naciaj lingvoj neniel ebligas kontentigan solvon de la lingva problemo ;

konsiderante, ke Esperanto pruviĝis absolute taŭga kaj uzebla en la praktiko kiel internacia lingvo kaj ne endanĝerigas la nacian prestiĝon kaj la nacian dignon, kaj ke la strukturo de ĉi tiu lingvo faras ĝin alirebla kaj akceptebla por ĉiuj nacioj ;

krome konsiderante, ke kreskanta nombro da ŝtatoj kaj internaciaj institucioj, konstatinte la bezonon pri internacia lingvo kaj la uzeblecon de Esperanto por tiu funkcio, estas preta enkonduki ĉi tiun lingvon en siaj internaciaj rilatoj ;

insiste petas al la nederlanda registaro kaj ĉiuj koncernataj instancoj :

1. konsideri la instruon de Esperanto en la instruistaj seminarioj kaj ebligi la instruon de Esperanto en la plej altaj klasoj de la elementaj lernejoj ;

2. esplori la eblon de internacia konvencio, koncernanta la akcepton kaj aplikadon de Esperanto.

Internacia Muzikfesto

Du Esperantistaj horoj—Magyarsag Dalegylet (Hungara, fervojista) kaj Coral Juventud Tarrasense (Hispana, vira) aliĝis al la Internacia Muzikfesto okazonta en Llangollen, Kimrujo de 11-a ĝis 15-a de Junio ĉi-jare. La Feston organizas la *British Council*, sed la komitato volonte akceptis la kunlaboron de la Esperanto-movado pri internacia reklamo.

Intencas ĉeesti ankaŭ S-ro R. Nielsen, Danujo, prezidanto de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio, por disraporti la Feston pere de reto de 186 Esperantistaj jurnalistoj en pli ol 30 landoj. Ĉi tiuj ricevos dum la Festo ĉiutagan raporton, kiun ili tradukos en naciajn lingvojn kaj servos al la gazetaro.

Oni intencas okazigi la Feston ĉiujare. Estas espereble, ke Esperanto ludos ĉiam pli gravan rolon en ĝi.

R.R.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio

Dum sia Paska kunsido, la Estraro de I.E.L. decidis instigi revigligon de la fakaj Asocioj. Iia valoro estas grava por la plua disvolvigo de nia movado.

Unu el la plej malnovaj, kiu antaŭ la milito atingis florantan staton, estas Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.

Ĝi kunligas kuracistojn, farmaciistojn, dentistojn kaj aliajn medicinrilatantajn profesianojn.

Ĝia organo, *Internacia Medicina Revuo* estis disvastigata sur la tuta mondo, kaj aperis regule ĝis kiam la krizo, kaj poste la milito, malhelpis ĝian pluan eldonadon.

Mi nun kredas, ke la momento venis, kiam ni devas klopodi restarigi tiun fakan movadon.

Kunsido de T.E.K.A. okazos dum la Internacia Kongreso en Bern.

Mi faras alvokon por ke la estintaj membroj de T.E.K.A. kaj ĉiuj aliaj interesatoj konigu al mi sian adreson. Mi sendos al ili Bultenon de T.E.K.A. kaj, eventuale, *I.M.R.* se la monrimedoj estos sufiĉaj por ĝia eldonado.

Mi ankaŭ volonte sendos malnovajn ekzemplerojn de *I.M.R.* al tiuj kiuj sendos respondkuponon.

Tiuj, kiuj de nun volas alporti konkretan helpon, estas petataj pagi la jaran kotizon, kiu estas du usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. Ĝi rajtigas ricevon de ĉiuj eldonaĵoj de T.E.K.A. El la landoj el kiuj tio estas ebla, oni pagu rekte al la poŝtĉekkonto N-ro 28,14,51 (Bruxelles, Belgujo). El la aliaj landoj, oni povas pagi al la Ĉefdelegitoj aŭ Perantoj de I.E.L.

Mi esperas, ke nia alvoko grupigos novan aron da fervoraj kunlaborantoj kaj ke baldaŭ refluos T.E.K.A. kaj ĝia gazeto *I.M.R.*

La Ĉefsekretario de T.E.K.A.

D-ro P. Kempeneers,

19 avenue Montjoie, Uccle (Bruselo, Belgujo)

Unua Norvega Sommerrestado Esperantista

okazos en la belega Lofthus en Hardanger de la 13a ĝis la 20a de Aŭgusto.

Hardanger estas la plej bela loko en okcidenta Norvegujo. Ĉiuj elementoj de la Norvega naturo troviĝas tie: fjordoj, valoj, montoj—kelkaj kun eterna neĝo sur la suproj—lagoj, kaj ŝaŭmantaj akvofaloj.

La restadejo—popola altlernejo—situas kiel perlo ĉe la mirinde bela Hardangerfjordo. Dum la restado estos aranĝataj pluraj interesaj ekskursoj al vidindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵoj. Por detaloj legu la reklamon sur kovril-paĝo 2.

Pedagogio

En Nov-Zelando la edukado estas ŝtato afero. Grava fako de la sistemo estas la Perkoresponda Lernejo, kiu celas eduki per korespondado tiujn 5000 infanojn, kiuj ne povas viziti ŝtatan lernejon. Je la 14a de Februaro, 1947, F-ino Mavis Ross, konata pedagogo, kun la helpo de du junaj membroj de la Khandallah Esperanto-Societo, faris bonegan tralandan radio-dissendon pri Esperanto, kaj sugestis al la membroj de la Perkoresponda Lernejo, ke ili starigu Esperantan Klubon. Tiu sugesto bone sukcesis, kaj la klubo estiĝis.

Post kelke da monatoj tiuj infanoj, kies aĝmezo estas 15 jaroj, volos komenci korespondadon. Oni do petas kunlaboron el la eksterlando. Skribu al la Ĉefdelegito. Se, en la fino de la jaro, oni povos fari al la Eduka Departamento bonan raporton, tio multe helpos la movadon.

Unu semajnon poste, tre konata nov-zelandano, F-ino Nola Luxford, parolis per tralanda dissendo pri sia reveno al Nov-Zelando post foresto en Usono. Tute neatendite, ŝi subite esprimis ĝojon, ke "oni tiom disvaste studas Esperanton en Nov-Zelando."

Brendon Clark

La pravigo de l'konkerinto

De CARL SPITTELER

Lin ankaŭ, la furiozulon kun la fera frunto,

La militestron kaj popolskurĝanton,

NEBUKADNECAR, la Morto fine trovis.

Kaj kiam nun tra la subteraj haloj

ŝancelis lia ombro, sin ĵetis miloj

kaj pliaj miloj da animoj palaj,

kun fermitaj pugnoj blasfemante kontraŭ lin

Kaj lin kondukis ĉe l'Juĝisto, venĝon postulantaj.

Sur alta trono sidis severmiena BAAL

kaj dudek anĝeloj kun glav' levita

Ĉirkaŭis lin! Je piedoj liaj kuŝis la leonoj.

"Ĉu povas nei ci la murdon centmilfojan?"

"Mi ĝin ne povas," respondis la militestro.

"Ĉu ci povas senkulpigi—tion kion faris ci?"

"Mi povas," "Per kio?"—

"La maron de sango kaj mizero,

Fluantan el la tero jam eterne,

mi kondukis en kanaloj. Tra la kanaloj

tamen fluis la mizero! Sed laŭlonge de la bordoj la ordo floris kaj la rajto".

"Leviĝu kaj sidiĝu je mia dekstro!"

Trad. Bebby Basler

ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiutage	15.30–15.45	Praha (Ĉeĥoslovakujo).	1935m. kaj 31.41m.
	21.00–21.15	Praha (Ĉeĥoslovakujo).	49.92m.
Lundo	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo).	104m. Poresperanta parolado.
	20.50–21.00	Praha.	470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	18.50–19.00	Sofia (Bulgarujo).	32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.
	20.50–21.00	Ostrava (Ĉeĥoslovakujo).	325.4m. Informoj. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	5.35–5.45	Wien I (Aŭstrujo).	506.8m. Esperanto-kurso. RAVAG-Wien, 30a Argentinierstr., Wien IV.
	10.15–10.35	Paris (Francujo).	431.7m. Esperanto-kurso.
	21.10–21.25	Warszawa III (Polujo).	49.06m. Informoj. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
Ĵaŭdo	16.50–16.55	Wien II (Aŭstrujo).	31m., 41m. kaj 228.6m. Informservo. RAVAG-Wien.
	17.45	Bern (Svisujo).	47.28m. (ankaŭ 200m. proks. laŭ raporto). Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat. Societo Svisa de Radio-dissendo, Bern.
	18.45–19.00	Hradec Králové (Ĉeĥoslovakujo).	280m. Esperanto-programo. Vychodočeky vysilač, Hradec Králové.
	20.50–21.00	Praha.	470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	18.10–18.20(?)	B.N.R.O., Brussel (Belgujo).	321.9m. Kurso. N.I.R., Esperanto-kursus, Eug. Flageyplein, Elsene-Brussel.
	18.50–19.00	Sofia (Bulgarujo).	32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.
	20.50–21.00	Ostrava.	325.4m. (kiel je mardo).
Sabato	15.10–15.25	Hilversum (Nederlando).	301m. Parolado. Nur je la 7a Junio kaj 5a Julio.
	19.00–19.45(?)	PRA 2 (Brazilo).	Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo).	49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni urĝe petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevado.

Internacia Radio-Servo—S-ro J. Jungfer, Prezidanto de la iama Internacia Radio-Komisiono, komisiita de I.C.K., anoncis ke li intencas rekomenci sian antaŭan laboron per regula eldono de kompleta Esperanto-Radio-Programo, kaj per la restarigo de Radio-Servo. Li petas ĉiujn antaŭajn kunlaborantojn sendi la nunajn adresojn, kaj li volas ricevi de radio-parolantoj, kursgvidantoj, k.t.p. detalan informon pri ĉiuj radio-dissendoj, venontaj kaj post la milito disaŭditaj. Lia adreso estas Lindenstr. 10, Lübben/Spreeewald, Germanujo.

Radio-amatoroj—Ni antaŭe raportis pri la starigo de Grupo de Esperantistaj Radio-amatoroj en São Paulo, Brazilo. Ni nun ricevis informon ke la grupo bone progresas kaj ke ili lastatempe nomis 11 radio-amatorojn por reprezenti la grupon en diversaj Brazilaj urboj. Oni petas leterojn kaj radio-kartojn (QSL) de Esperantistaj radio-amatoroj de la tuta mondo. La adreso estas Rua José Bonifácio 223-8, S/802, São Paulo, Brazilo.

32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, Svisujo. 26 Julio-2 Aŭgusto, 1947

Adreso por ĉiuj komunikadoj, Bundesgasse 20, Bern

8a Listo de Kongresanoj

802. F-ino I. Lindén, Grycksbo, Svedujo
803. F-ino K. Jönsén, Grycksbo, Svedujo
804. G. R. Dismark, Fritsla, Svedujo
805. F-ino M. V. Dismark, Fritsla, Svedujo
806. A. H. Fridén, Falköping, Svedujo
807. G.-A. F. Loman, Orebro, Svedujo
808. H. K. Nilsson, Sandared, Svedujo
809. J. J. Triebenbarker, London, Britujo
810. F-ino J. Rogerson, Wellington, Nov-Zelando
811. F-ino E. Simpson, Wellington, Nov-Zelando
812. J. Schmid, Bern, Svislando
813. M. J. Sturm, Bern, Svislando
814. A. Lovati, Milano, Italujo
815. D-ro G. Crippa, Milano, Italujo
816. M. F. W. Schreck, Bern, Svislando
817. A. Andersson, Uddevalla, Svedujo
818. F-ino W. Andersson, Uddevalla, Svedujo
819. F-ino M. Kofoed, Uddevalla, Svedujo
820. F-ino L. Matsson, Uddevalla, Svedujo
821. F-ino A.-G. Winberg, Uddevalla, Svedujo
822. K. A. Larsson, Tuna-Hästberg, Svedujo
823. E. Lundvall, Tuna-Hästberg, Svedujo
824. T. E. Johansson, Sköldinge, Svedujo
825. A. Ericson, Sköldinge, Svedujo
826. C. Larsson, Sala, Svedujo
827. S. Leuenberg, Basel, Svislando
828. H. S. Schroepfel, Galesburg, Usono
829. S-ino H. S. Schroepfel, Galesburg, Usono
830. A. K. Azevedo Costa, Belo Horizonte, Brazilo
831. A. Lan do Carmo, Petrópolis, Brazilo
832. Rezervita de Brazilo Ligo Esperantista, Rio de Janeiro, Brazilo
833. Rezervita de Brazilo Spiritista Federacio, Rio de Janeiro, Brazilo
834. V. Ehtner, Praha, Ĉeĥoslovakujo
835. S-ino M. Dahl, Uddevalla, Svedujo
836. Patro J. De Maeyer, Nivelles, Belgujo
837. D-ro Enrico Celio, registarano, Bern, Svislando
838. Pastro E. Waldvogel, Estavayer-le-Lac, Svislando
839. F. Epstein, Hamburg, Germanujo
840. S-ino A.-L. Spook-Gullholmer, Askersund, Svedujo
841. F-ino M. Milde, Sundsvall, Svedujo
842. F-ino E. Jansson, Sundsvall, Svedujo
843. S-ino D. Cardy, London, Britujo
844. F-ino C. D. Cardy, London, Britujo
845. S-ino A. Sutcliffe, Ashton-u.-Lyne, Britujo
846. F-ino J. A. Cox, Burton-on-Trent, Britujo
847. T. W. Bailey, London, Britujo
848. F-ino A. Horner, Clitheroe, Britujo

849. J. W. Blair, Paisley, Britujo
850. C. E. Wallington, Wellington, Britujo
851. W. Hollister, Rishton, Britujo
852. F-ino K. L. Fitton, Huddersfield, Britujo
853. S-ino R. Fitton, Huddersfield, Britujo
854. F-ino R. S. Fitton, Huddersfield, Britujo
855. S-ino H. Renman, Sundsvall, Svedujo
856. A. Clavenna, Genova, Italujo
857. S. G. Sjöblom, Malmö, Svedujo
858. A. Hermansson, Uddevalla, Svedujo
859. S-ino R. Hermansson, Uddevalla, Svedujo

Statistiko de Kongresanoj

Argentino	..	3	Italujo	..	11
Aŭstralio	..	2	Jugoslavujo	..	8
Aŭstrujo	..	1	Luksemburgo	..	1
Belgujo	..	21	Nederlando	..	6
Brazilo	..	8	Norvegujo	..	2
Britujo	..	500	Portugalujo	..	3
Bulgarujo	..	2	Sud-Afriko	..	2
Ĉeĥoslovakujo	..	8	Svedujo	..	108
Danujo	..	2	Svislando	..	110
Finnujo	..	3	Usono	..	8
Francujo	..	10			
Germanujo	..	6	32 landoj	..	859
Irlando	..	7			
Islando	..	27			

Voĉo el Firenze

La Florencaj samideanoj decidis aranĝi dokumentan ekspozicion kiel pruvo de la uzado de Esperanto en la tuta mondo. Tiu propaganda manifestado okazos je la dua semajno de oktobro en Firenze, kaj estas necese ke la organiza Komitato povu ricevi la koncernan materialon kiel eble plej frue.

La Florencaj Esperantistoj petas la samideanojn el ĉiuj landoj ke oni bonvolu sendi aŭ pruntedoni ĉiaspacajn dokumentojn pri la nuna esperanto movado recipie pri uzado de Esperanto en la komerco, turismo, filatelio, literaturo k.t.p. Peresperantaj gazetoj, gvidfolioj, katalogoj, komercpaperaĵoj estas ĉefe dezirataj.

Ĉion oni devas sendi al la firmo Martini Alberto, ekspozicio de U.E.A., Aleardi strato 38, Firenze (Italujo). Al la sama firmo povos peti klarigojn pri la pruntedonoj. Al la plej gravaj kaj efikaj sendaĵoj la Komitato sendos senpage fotokopion de la efektivigita ekspozicio.

prof. Corrado Grazzini, Delegito

Georges Agricola :

SVISLANDO VIDATA ALIMANIERE

La turisto vizitanta Svislandon vidas nur eron el tiu ĉi mozaiko de lando kaj popolo, nome la turisman. Laŭ la ideoj alilande, la Alpa respubliko estas ununura hotelo, produktas ĉefe lakton, buteron kaj fromaĝon, plie la horloĝojn, kiuj abundas kvazaŭ kreskantaj kiel malbona herbo. Laŭ gvidlibreto disdonita al usonaj libertempantaj soldatoj, la sviso estas statistikema kaj parolas kvar lingvojn. Pli severa observanto priskribas la karakterizaĵojn jene: Sviso estas homo, kiu ĉe semajnfino promenas civilvestite kun pafilo, post plenumo de la deviga pafekzerco ludas "Jass" kaj ĉiudimanĉe voĉdonas pri io ajn. Certe tio estas karikaturo bildo, sed iel la homoj konsideras ja la proksimulon kiel strangan estaron.

Tie ĉi inter kvar regnoj kun ekspansia povo grandega kaj kun deziro sin protekti kontraŭ la avida najbaro, vivtenas sin jam la sepan jarcenton tiu ĉi Svisa Konfederacio, unika kiel ŝtato, ĉiukaze fremdaspekta por la najbaroj. Naskiĝinta el sento de sendependeco nebridebla de tri arbarkomunecoj, Schwyz, Uri kaj Unterwalden, kreskis ŝtato malgranda sed kun granda ideo: libereco. Ankoraŭ nun validas la juro de l'Rütli, la ideo angulŝtono de la konstitucio svisa kaj Schiller, neniam vivinte en Svislando formulis ĝin kun profeta vido:

*Ni estu unu nur frataro, nek
disunuiĝu en danĝero iu!*

*Ni volas esti liberuloj kiel
prapatroj niaj kaj preferi morton
ol vivi submetite en sklaveco*

Nek premo militista, nek penetrado ideologia povis ŝanĝi ion en la primitiva koncepto de la Konfederacio. Sobraj, kalkulantaj, celkonsciaj burĝoj kaj kamparanoj formis la ŝtaton, hodiaŭ egale ili regas. Dudekdu ŝtatoj, interne sendependaj, ĉiu malsama laŭ evoluo, laŭ tradicio kaj aspiro, lingve dividitaj vivas kune, ne romantik-harmonie, sed komprenantaj, ke ili devas vivi kune, toleri unu la alian. Jen la dua maksimumo post la libereco: toleremo.

En 1948 pasis tricent jaroj, ke Svislando eliĝis de jure el la Germana "Reich" la sendependiĝo de facto jam ne estis plu ŝanĝebla. Kaj estos cent jaroj, ke okazis la lasta milita disputo inter svisoj, la milito de la Sonderbund, kiu metis finon al la ĉiama enmiksado de la eksterlando. La nova konstitucio transformis la ĝistiaman

Ligon de Ŝtatoj en Ŝtatligon kun centra registaro en Bern. Hodiaŭ ĉio tio jam estas antikvaĵo sed kio ne multe ŝanĝis estas situacio kiun priskribis la fama Grimmelhausen en sia aŭtobiografia libro, aperinta en 1650, la *Simplizius Simplizissimus*. Jen la perlo, de teksto, priskribanta situacion, ripetigantan denove dum nuna militado:

"... kaj ni venis la saman nokton kaŝe trans la svisa landlimo kie sekvantan matenon ni atingis vilaĝon... La lando aspektis por ni fremda kontraŭ germanaj landoj kvazaŭ mi estus en Brazilo aŭ en Ĉinujo. Tie ĉi ni vidas la homojn agadi pace, la ŝtaloj estas plenaj je bestoj, en la kortoj kuras kokinoj, anseroj kaj anasoj, la ŝtatoj estas sekuraj kaj la gastejoj plenaj de kontentaj homoj. Nenia timo pro malamiko, nenia zorgo pro rabado, nenia timo perdi havaĵon kaj vivon. Ĉiu vivas trankvile kaj sekure, tiel ke ni konsideris tiun ĉi landon kiel teran paradizon..."

Iam la svisoj estis soldatoj servintaj en la armeoj de la tiamaĵ granduloj, ĉefe por la francaj regoj. Tiun ĉi servadon rigardas iuj kiel esprimon de aventuro kaj de heroeco, aliaj kiel kondamnindan faron. Reale ĝi estis nenio alia ol la vendo de la disponebla popolforto, ne trovinte la panon sur tero maldanka. Kaj iam la svisoj ankaŭ serĉis grandigi la vivspacon! La ekspansio finis la giganta batalo de Marignano en la Lombardio, 1515. Tiu ĉi jaro estis la naskiĝo de la tria ŝtatmaksimo svisa: la neŭtraleco.

Depost la Napoleona militoj, Svislando ne vidis plu fremdajn armeojn sur sian teritorion, la neŭtraleco estis akceptita de la Viena Kongreso kun la samtempa devigo ĝin defendi ankaŭ. Trifoje dum la daŭro de 130 jaroj, la minaco esti baltokampo por la najbaroj estis tre proksima, neniam tiom timige kiel dum la daŭro de la Tria Regno. La dogmo de la Tria Regno, ke ĉiuj landoj, iam partoj de la Germana Ligo devos reveni al nuntempa Germanujo, nenie renkontis pli fortan opozicion, pli ĝeneralan rifuzon ol en Svislando kaj precize inter germanlingvaj svisoj. Malmultaj nur komprenas kian silentan batalon devis gvidi la svisoj por konservi sian spiritan sendependecon, intime ligatan al la politika. Kaj estas iom naive, se iuj opinias, ke la svisoj ja multe profitis de la du lastaj militoj, laborantaj por la aliancanoj kiel por la germanoj, eĉ dum la pasinta militado nur por la germanoj. Neniu ja estis preta kontraŭi la germanan danĝeron kaj

kiam la svisa leĝdona povo akceptis leĝojn en la jaro 1935 por certigi kaj fortigi la batal-potencialon de la armeo, tiam en iuj landoj oni mokis pri tio. La germanoj ja estus facile sukcesintaj, jam la manko de karbo (kiun plej-grandparte liveris Germanujo) povis praktike mallongigi la rezistadon. La tiaman situacion, nome la simpatian ĝeneralan de la popolo por la alianco kaj la ŝtatan neŭtralecon kiu devigis labori por Germanujo ilustras la anekdoto cirkulanta: "Dum la semajno ni laboras por la germanoj, sed dimanĉe ni preĝas por la venko de la Alianco." La daŭra preteco de armeo (30% de la popolo estis soldatoj) la transformo de la lando en ununura fortikaĵo englutis milionojn kaj ŝtatŝuldo atingas preskaŭ dek miliardojn (10000 milionojn da frankoj !)

La neŭtraleco de la ŝtato ne signifas flankenstaro je la vido de la grandega katastrofo kiu falis sur la mondon. *Inter Arma Caritas* estas la devizo de la Ruĝa Kruco, ideo de ĝenevano Henri Dunant kaj la bonfaron oni praktikis larĝe dum la pasinta militado. Jam kiam la Tria Regno sin senigis de siaj nedezirinduloj, miloj da rifuĝintoj venis, kaj formis gravan zorgon por la registaro. Ne mankis kritikoj pri la kelkfoje burokrata sinteno de la polic-organoj, sed sciante kaŭzojn oni minimume devas kompreni tiun ĉi sintenon. Svislando havis la duban privilegion kalkuli je tre forte organizita Kvina kolono sub la protekto de la germana legacio. Ja eĉ inter rifuĝintoj (ĉu efektivaj?) troviĝis elementoj pretaj agi kontraŭ la gastlando. Hodiaŭ ĉio tio estas finita ĉapitro. Novaj taskoj venis. La svisa popolo partoprenas en larĝa mezuro al la rekonstruo de Eŭropo kaj al la savado de la malsatantaj kaj malesperantaj najbaroj. La internaciaj organizaĵoj antaŭ ĉio la Organizo de la unitaj Nacioj (ONU) elektis ree Ĝenevon kiel sidejon, internaciaj konferencoj ĉiaspecaj okazas tie ĉi kaj unu kongreso sekvas la alian. Paca insulo en disunigita Eŭropo, tiel sin prezentas Svislando kaj idealistoj ne malprave opinias, ke Svislando povus esti modelo por estonta unuigita Eŭropo. La rolon de Svislando, poeto formulis jene:

Ne plu sekurigas vian respublikon, svisoj,
via kuraĝo leona, subiginta l'armeojn de
Habsburgo
preninta al Karlo, Dukon de Burgundo,
vivan kaj gloron.

Ne plu la ambicio, prove pesante sceptron de
Milano, dume gigantajn batalojn
sur lombardaj ebenaĵoj decidis
viaj armiloj.

Heroa gloro iam preskaŭ vin levis al monda
potenco;

Aliaj tempoj, aliaj moroj donis
aliajn kolonojn al via ekzisto, al vi mem
pli altan celon.

Via malgranda ŝtato distingiĝu per grand-
animeco!

Montru la benon de la libereco al popoloj
eŭropoj!

kaj per saĝeco de viaj leĝoj estu por ili
ekzemplo!

Hch. Leuthold

Svislando

Post la 32-a Kongreso

En Zŭrich, la metropolo de la svisa komerca, trafika kaj kultura vivo ekzistas Esperanto Societo, kiu invitas la kongresanojn al la sekvanta aranĝo:

Sabato, la 2-a de Aŭgusto 1947:

posttagmeza vojaĝo de Bern al Zŭrich
20.00 Interkonatiga vespero en kongresejo

Dimanĉo, la 3-a de Aŭgusto:

matene: vizito de la urbo
posttagmeze: ŝipekskurso sur la lago
vespere: amika kunveno

Lundo, la 4-a de Aŭgusto:

tuttaga ekskurso kun fervojo kaj ŝipo al la
lago de Zug - Arth - Goldau - Rigi - Vitznau -
kvarkantona lago-Luzern-kaj reveturo al
Zŭrich; de la famekonata monto Rigi
(1800 m) vi vidos belegan panoramon de la
alpoj ĝis la Rejno.

Je nefavora vetero ni aranĝos vizitojn de
muzeoj, Universitato, plej moderna poŝtoŝtanco
de Eŭropo, artgalerio k.t.p. kaj ni redonos la
monon por la ekskursoj.

La prezo por la vojaĝo al Zŭrich, bona hotelo
(3 tranoktoj + 3 matenmanĝoj) kaj por la
ekskursoj de 80 svis. fr. vi pagos al nia poŝt-
ĉekkonto VIII 17287 en Zŭrich aŭ al Universala
Kongreso de Esperanto en Bern.

Pagu kaj anoncu vin antaŭ la fino de Junio,
por ke ni rezervu hotelĉambron por vi. Adreso:
Esperanto Societo Zŭrich, Kirchgasse 14, Zŭrich.

Scienco

D-ro W. J. A. Manders, docento en la gimnazio
de la Patroj Aŭgustenanoj en Venlo, kiu antaŭ
kelkaj jaroj tradukis *Odyseus de Homerus* el la
greka lingvo en Esperanton, doktoriĝis la 25-an
de Aprilo en la Universitato de Utrecht pri
Literaturo kaj Filozofio per disertacio *Vijf
Kunsttalen* (Kvin Artefaritaj Lingvoj): Volapük,
Esperanto, Ido, Occidental, Novial, kun 21 tezoj.

RECENZOJ

*=akireblaj ĉe I.E.L.



Biblio aŭ Instru-Aŭtoritato :

de P. van Dorp, Sac. Trad. el Nederlandlingvo Frato M. Monulfus. Eld. Internacia Katolika Informejo, Frater-

huis, Loonopzand, Nederlando. 24 × 15 cm. 87 p. Prezo 1,60 Ned. guld. aŭ 8 resp. kup.

Kiel oni trovu la veran Kristan doktrinon ? Ĉu per legado de la Sanktaj Skriboj, per individua persona revelacikonstato, aŭ per Eklezia instruado ?

Tiun temon traktas ĉi tiu libro per argumentado racia kaj solida. Ne en la nuboj la aŭtoro havis la kapon, sed certe staris kun la piedoj firme sur la tero. Unue, li prezentas siajn aksiomojn ; poste, konstruas la argumenton, alfrontante nin per diroj kaj faktoj, kiujn neniu serioza Kristano povus nei.

Supezble, la protestanto trovos sian kontraŭargumenton, sed nesamvorteco—iom ofta—inter la Bibli-citaĵoj kaj tiuj de la protestanta Biblio, neniel utilis tiucele. La tradukajon oni povas malakcepti, sed malakcepti la premison el ĝi uzatan estas, plurloke, nei Kriston !

Lingve, la libro estas multe pli altnivela ol la granda plimulto da Esperantaj libroj, kaj multan laŭdon meritas la korektinto, S-ro A. G. J. Kuipers. La stilo tamen ne ĉiam estas simpla, sed pri tio kulpas nek tradukinto nek korektinto.

Por katolikoj la libro certe plifirmigos ilian kredon. Ĝi estas verkita tamen ne por katolikoj, sed por protestantoj. Ilin ĝi pensigos, kaj tial ĝi meritas legadon de ĉiu serioza Kristano.

(Parenteze, la subskribinto ne estas katoliko).

T. Pendlebury

Roterdama Urbokoro : eld. Adviesbureau Stadsplan Rotterdam, Coolsingel 107, Nederlando. Broŝ. multobligita, 28p. La famo pri la detruo de Rotterdam disvastiĝis preter la limojn de Nederlando, kaj la planoj pri rekonstruo certe vekos la intereson de fakuloj en aliaj landoj. Bonvena do estas ĉi tiu informilo, eldonita en tre limigita kvanto. Per la informoj prezentitaj, evidentiĝas ke la Rotterdam-anoj rigardas la nove konstruotan urbon objekte kaj kun perspektivo de eventuala progreso antaŭ siaj okuloj. Valora kontribuo al la fako urbkonstrua.

M.S.

***Unua Vojaĝo Ĉirkaŭ la Mondo :** A. da Silva ; eldonis Portugala Eldona Rondo ; el Port. lingvo trad. J. J. Rodrigues. 17.2 × 12.8 cm. Broŝ. 24p. Prezo : 10p. aŭ 3 rpk.

Ĉi tiu eldonaĵo, kun titolo memklariga, komencas novan serion de kultur-sciencaj verketoj. En la modesta kadro, per kiu oni limigis sin, oni sukcesis interese kaj klare prezenti la ĉefajn faktojn pri la ekspedicio de Ferdinando de Megalhães.

Oni anoncas *Kontrolita de la Literatura Komitato*. Estus interese scii el kiuj personoj konsistas tiu Komitato, kaj kiaj estas iliaj kompetentoj. La principo tamen estas aprobinda.

La stilo ĝenerale estas simpla kaj klara, malgraŭ pluraj provincaj esprimoj, kiujn oni devus eviti. La ĉefaj eraroj estas la intermikso de verbtempoj sur p.7 kaj la formo *escepte de* anst. kun *escepto de*. Mi precipe aludas tiun lastan, ĉar en la nuna tempo tre multaj Esperantistoj ŝajne ne perceptas, ke inter la du estas granda diferenco de signifo. La tradukinto plurfoje uzas *nun* kun *-is*, formon kiu estas uzata en iuj naciaj lingvoj, sed kiu ne konformas al la logika strukturo de Esperanto.

M.S.

Povo Sukcesi : de H. T. Hamblin, el Angla lingvo trad. F. W. Hipsley. Eld. la tradukinto, 17 Abbots Rd., Birmingham 14, Anglujo. 15.8 × 10.2 cm., broŝ. 28p., prezo 4 int. rpk. Instruaj kaj konstruaj konsiloj laŭ la skolo de Pensologio. Tre multaj homoj tamen neas la efikon de tiaj principoj en la tiel nomitaj *praktikaj* aferoj de la vivo. Multo dependas de la individuo.

Ĉiuj verketoj de F. W. Hipsley estas ornamoj, laŭ lingva vidpunkto, al nia literaturo, kaj ĉi tiu ne estas escepto, malgraŭ du-tri bagatelajoj pri kiuj povas ekzisti diferenco de opinio.

M.S.

Esperanta gazeto en Italujo : Antaŭ pli ol unu jaro aperis la unua postmilita Esperanto-gazeto en Italujo. *Verda Steleto*, redaktita en Itala kaj Esperanta lingvoj, estas *sendependa monata revuo de la Italaj Esperantistoj*, laŭ ĝia subtitolo. Ni tamen rimarkas—kaj ĝojas—ke oni disponigas lokon al la laborista Esperantistaro. Redaktejo kaj administrejo : Via Modena 33, Torino. La gazeto estas mendebla ĉe I.E.L., abono 3 ŝil.

KIE ESTAS KIU?

Servo de reserĉado de U.E.A.

Sesa Listo

S-ro Saribek Agamjan, profesoro pri botaniko, esperantisto el Kaŭkazo, verkinte sub la nomo *Narciso*, nun: Bad Cannstatt bei Stuttgart, Tannenbergrasse 6, US Zone, Germanujo.

Sinjoro Dipl. Ing. Ulrich Ahrens, estinta D. de U.E.A. en Schwerin, nun: (3) Schwerin, Mecklenburg, Jungfernstieg 10, Sowjet. Zone, Germanujo.

S-ro Armand Austrums, latva esperantisto, dislokita persono, DP, nun: (13b) Camp Wolfartshausen bei München, US Zone, Germanujo.

S-ro Otto Bahn, iama Delegito de U.E.A. en Wismar, nun: Bernburg, Prov. Sachsen, Wilhelmstrasse 17, Sowjet. Zone.

S-ro Artur Baumgart, estinta Delegito de U.E.A. en Landeshut, Silezio, nun: Goethestrasse 12, (10) Bautzen, Sa., Sowjet. Zone.

S-ro D-ro F. J. Belinfante, el Nederlando, nuna adreso: Department of Physics, University of British Columbia, Vancouver, Kanado.

S-ro Erwin Gerhard Bernfeld, ĉefdelegito de U.E.A. por Aŭstrujo ĝis 1935, rifuĝis 1938 al Novzelando. Nuna adreso: 16 Ingestre Street, Vogeltown, Wellington, S.W.I, Novzelando.

S-ro Paul Bröther, estinta Del. de U.E.A. en Bad Warmbrunn (Gigant-Montaro) forpelito, nun: Hockeln No. 46, (20) Marienburg Post Gross-Düngen, Brit. Zone.

S-ro Ewald Desch, estinta Del. de U.E.A. en Homborg, Rejnlando, nun: (22a) Homborg, Niederrhein, Feldstrasse 22, Brit. Zone.

S-ro Gustav Eichmüller, estinta Del. de U.E.A. en Poprad Slovakio, Ĉ.S.R., nun: Schmölln i. Thüringen, Germanujo, Lindenberg 1, (Sowjet. Zone).

S-ro Kurt Elias, estinta ano de U.E.A. en Breslau, nun: (10) Diethensdorf bei Burgstädt, Sachsen, Russische Zone. (Petas vivsignojn de esp. amikoj).

S-ro Alfons Frey, estinta Del. de U.E.A. en Lippstadt, perdinte oficon pro la NAZI-teroro, nun: Brilon, Westfalen, Königstrasse 4, Brit. Zone, Germanujo.

Fino Gabrielle Gérard, iama Del. de U.E.A. en Parizo, nun: 14 rue Roche Appert, Loches, Indre et Loire, Francujo.

S-ino H. Gscheidel-Pauli, (estinta Pauli) eksdel. en Michelstadt im Odenwald, nun: (14a) Crailsheim, Wrthtg., Schlossbergstr. 45, Germanujo, US Zone.

S-ino Margarete Hampf, nask. Solm, el Hirschberg en Silezio, ekzilita en (16) Bad Seden, Taunus, Auf der Weide 5, US Zone.

S-ro Josef Hauf, estinta Del. de U.E.A. en Bodenbach (germana nomo por Podmokly) en Ĉeĥoslovakujo, nun: (19a) Dörschwitz 11, über Merseburg Land, Sachsen, Sowjet. Zone.

S-ro Herbert Häussler, estinta D. de U.E.A. en Reichenbach i.V. revenis el militkaptiteco usona. Nuna adreso: (10) Reichenbach i.V., Sachsen, Kelpingstrasse 5, (Sowjet. Zone).

Fino Elise Jacobs, estinta Del. de U.E.A. en Flensburg, Schleswig-Holstein, nun: (24b) Flensburg, Mathildestrass 9, Brit. Zone.

S-ro Walter Johne, estinta Del. de U.E.A. en Freital, Sa. Germanujo, nun: Richard Wagner Platz 5, (10) Freital 1, Russ. Zone.

S-ro Walter Knopf, Oberstudiendirektor, estinta Del. en Beuthen, Supra Silezio, nun: (2) Cottbus, Promenade 6, Sowjet. Zone. S-ro Knopf estas unu el ĉi tiuj vere heroecaj germanoj, kiuj rezistis en la decida momento al la Hitlera movado. Perdis situacion, estis kondamnita al morto pro sia defendo de la rajtoj de la pola loĝantaro, estis savita de la aliancanoj. Rekonita kiel principa aktiva rezistanto, la nuna registaro redonis al li oficon kaj rangon. Ni respektu salutn ĉi tiun samideanon, por kiu la interna ideo ne estis nura vorto.

S-ro Fritz Köditz, stud-konsilisto, (22a) Wipperfürth, Bezirk Köln, Lennepstrasse 25, Brit. Zone, Germanujo.

S-ro Anton Krikawa, estinta Del. de U.E.A. en Deĉin, Ĉeĥoslovakujo forpelita el tiu ĉi lando, loĝas nun: (17a) Ziegelhausen bei Heidelberg, Mühlweg 5, US Zone.

S-ro Albert Maurer, estinta Del. de U.E.A. en Hattersheim, nun: (16) Hattersheim, (Main) Kriftelerstrasse 5, US Zone.

S-ro Gustav Menges, aktiva aganto en la Tutmonda Junulara Ligo, nun: (18) Gleisweiler über Landau, Pfalz, Germanujo, Franz. Zone.

S-ro Voldemaro Rozentals, latva esperantisto el Riga: Central Latvian D.P. Camp, Infanterie

Kaserne Block 5-13, (13a) Würzburg, Bayern, Germanujo.

S-ro K. O. Schmidt, estinta sekretario por Germanujo de la Teozofia Ligo Esperantista, en Flensburg, nun: (14b) Reutlingen, Baumgartenweg 7, Germanujo (Franz. Zone).

S-ro Prof. Franz Sieber, estinta Del. de U.E.A. en Freiwaldau, Ĉeĥoslovakujo, nun: (13b) Donauwörth, Bayern, R.A.D. Lager, Bar. 12/3, US Zone.

S-ro Georg Sieche, estinta D. de U.E.A. en Hirschberg, Silezio, forpelita el sia hejmlando, nun: (23) Syke bei Bremen, Steinkamp 12, Brit. Zone.

S-ro Georg Streidt, verkinto de la esperanto lernolibro por popol-lernejoj, studkonsilisto en Leipzig, nun: (13a) Grosschlattengrün, Oberpfalz, Bayern, Basaltwerk (US Zone).

S-ro J. Šimaitis, litova samideano "dislokita persono", nuntempe en UNRRA-AVEA 1042, (13a) Scheinfeld, Bayern, US Zone.

Esperantista Interhelpo

Je centoj alvenas la helpokrioj de suferantaj samideanoj kaj kun profunda ĉagreno ni devas anonci al ili, ke ni ne havas la rimedojn, sendigi nutraĵpakajojn. Ni povas sendi medikamentojn (al Germanujo nur letere sendeblajn !) kaj peradi eventualajn donacojn de bonvolaj samideanoj en aliaj landoj.

Ni ricevas petojn de sinceraj esperantistoj, kaj bonvolaj donacintoj volu rilati kun ni. Ni akceptas por pagoj, validajn respondkuponojn (valoro 30 centimoj sv.) de landoj kie mono ne estas sendebla.

Ni atentigas, ke kelkfoje necesas du ĝis tri monatoj ĝis alveno de mendita "amdonaco". Malaperas ankaŭ tiaj sendaĵoj, sed la liverantoj anstataŭas, ĉar ĉio estas assekurita. Ni rimarku plie, ke sendaĵoj por la sovjeta zono en Germanujo, estas submetataj al speciala reĝimo. Ne dezirante perdi tempon kaj monon, ni dumtempe ne povas peri por tiu ĉi zono.

Pluraj samideanoj demandis informojn pri gastigado de infanoj en Svislando. Ni volonte estus pretaj interveni ĉe la Svisa Ruĝa Kruco (Infanhelpo) sed ĝenerale la R.K. ne deziras tiajn intervenojn, laborante laŭ plano fiksita kaj aprobita de la interesitaj registaroj civilaj kaj militistaj. La elekto de la infanoj estas tiom rigora ke ĉia bonvola influo de ia flanko estas rigardata kiel provo subaĉeti plenumantojn de la helpagado.

Multajn petojn sendi librojn esp., ni jam ricevis de germanaj samideanoj, sed ne povas plenumi pro poŝta kondiĉo. Nome de Svislando oni povas sendi nur leterojn ĝis 500 gramoj sed ne presaĵojn. Tuj kiam estos eble sendi librojn ni dissendos al petantoj kion ni disponas. Je oportuna tempo ni informos tie ĉi.

*U.E.A. Serva centro,
Palais Wilson, Genève*

Instru-materiale

La laborista mezlernejo en Maabarot, Palestino, petas por instruado laŭ moderna metodo materialon. La temo prilaborata de la lernantoj titolas: Tra la mondo, precipe geografia temo. Oni bezonas pro tiu ĉi studado ĉiulandajn ilustraĵojn, bildojn, mapojn, statistikajn diagramojn, faktojn pri la kultura, ekonomia, religia kaj socia vivo. Estas dezirataj ilustritaj presaĵoj pri arto, vidindaĵoj. Statistikaj informoj nur la plej lasttempajn. Dokumentoj povas esti en kiu ajn lingvo. La lernejo direktas tiun ĉi peton al instruistoj, lernejoj, kultur-institucioj, kaj varme dankas por la ricevota materialo. Sendu al: Grigor G. Choutoff, Maabarot, Palestino.

Junular-movado

La Sveda sekcio de la Tutmonda Junular-Organizo ĉi-jare organizas kunvenon 12-15 Julion en la bela regiono Kolmarden/Jursla apud la urbo Norrköping. Ĝi okazos tuj post la internacia somerkurso en Skövde, kiu troviĝas malproksima 200 kilometroj.

Oni aranĝis allogan programon, kies detalojn oni povas ricevi de Sveda Esperanto-Federacio (Junulara Sekcio), Tegelbacken, Stockholm.

Perfido

*Ĉu vi scias, belulino,
Ke la belo vin insidis?
Ve al mi, al vi la fino!
Mia amo vin perfidis.
Ĉar de vi mi tro admiris
La belecon de l' vizaĝo,
La edzino ekdeŝiris
Vian bildon de la paĝo.*

*Originale: Brendon Clark
(Novzelandio)*

AVIADO KAJ LINGVO INTERNACIA

Kiam Noah kontrolis la bestojn enirantajn duope en la arkeon, li sendube sentis sin supera, rigardante laŭlonge de la vico kaj konstatante, ke veruka porko mallaŭte babilaĉas kun siaj geamikoj, la anaso, la pacienca bovino, la kanguruo kun malplena poŝo, la elefanto kaj ĉiuj ceteraj bestoj. Li sendube dankis al Dio, ke li ne estas kiel ili estas, kaj tamen li estus evitiginta multajn zorgojn, ĉagrenojn kaj sangajn militojn al siaj posteuloj, se li en kelkaj materiaj detaloj kondukus kiel kamp-bestoj. Ili almenaŭ konservis dum jaroj senmakula la simplan parolon, per kiu Dio provizis ilin. La mevo certe ne havas la vortaron de Shakespeare, sed la mevoj ĉe la albirdigejoj de St. Ives, Britujo, tamen povas konversacii kun la mevoj en la doko de Halifax, Nova Scotia, Bermudo aŭ iu ajn alia parto de la mondo, kie ili hazarde vivas, sen la plej eta malfacilaĵo.

Sed la posteuloj de Ŝemo kaj Hamo kaŝis sin malantaŭ montoj kaj altaĵoj, transe de la nekulturita dezerto, ĉirkaŭ la fontoj kaj potencaj riveroj de la mondo kaj forfremdiĝis unuj de la aliaj tiel, ke pri lingvo, manieroj, kutimoj, moralo, leĝo, konvencioj, monnormo, eduko, vestaĵoj, sano, neniu vivanta homo povas kompreni ilin ĉiujn; kaj nun, neniu homo deziranta flugi kiel birdo trans la mondon povas fari tion sen subskribo de diversaj dokumentoj, uzante la pagitan servon de advokatoj, libro-revizoroj, enmigroficistoj, medicinistoj, sen frenezigo pro la bagatelaj detaloj de komunuma politiko, delikatsentoj, vanecoj, timoj k.t.p.

Se mia ĉie-stanta amiko Henriko, ĉarma kunulo, volas iri trans la mondon por vidi sian patrinon, ĉu li povas flugi kiel aglo aŭ mevo kun fulmaj okuloj per fulma rapideco? Nuntempe li ne povas; li postlasas argentan spuron kiel muka heliko, kaj kiam li faris sian vojaĝon, se li travivas ĝin, mil malgrandaj homoj sur ĉiuj limoj povas fiere fanfaroni pri la ne-pereonta akto, ke mia amiko estis ĉe ilia limo en tiu kaj tiu tago kaj ie aliloke proksiman tagon. Kiom gravas tio? Sed ne estas bone, ke mia amiko devas esti tiel turmentata per la prokrastagoj je ĉiu stadio de sia vojaĝo. Tial benu la nomon de ĉio, kio havas *Internacia* en sia titolo. Dum 25 jaroj la tendenco estis rigardi ĉion internacian kiel ne-personan, vanan, sterilan, nenacian kaj tial neinteresan aŭ negravan. Nun la proksima paŝo en la mondprogreso estas evoluigi internacian kunlaboradon, kaj en neniu sfero tio estas pli

ekscita, pli necesa, pli amikecformanta ol ĉe aervojaĝo. Kiom pli ni ekinteresiĝis pri Parizo kiam la longeco de la tagvojaĝo de Londono estis mallongigita ĝis sep horoj! Kiom pli ni ekinteresiĝis kiam ekzistos aviadaj servoj el dekludo da aviadetoj kaj la tuta vojaĝo daŭros nur 50 minutojn! Tio ne okazos tuj; diversaj problemoj devos esti solvataj—problemoj de produktado, alĝustigo, aviadet-konstruo, internaciaj interkonsento kaj direktado. Sed post jardeko ni povos rigardi al epoko, kiam neniu lando en Eŭropo troviĝos pli ol tri horojn laŭdistance de ni kaj kiam la aervojaĝoj ĝis la Rokoj, Andoj kaj la Pacifika Bordo de iu ajn Amerika lando, ne daŭros pli longe kaj eble ne kostos pli multe ol antaŭmilitaj vojaĝoj per ŝipo aŭ vagonaro ĝis Svisujo kaj Italujo.

Estas malfacile rezisti al la konkludo, ke kiam tiaj intimaj kaj oftaj kontaktoj fariĝos uzebaj, pripensemaj homoj de ĉiuj klasoj kaj en ĉiuj landoj volos renkonti kaj paroli kun homoj de simila speco eksterlande. La transformiĝo de nia sinteno al eksterlandanoj povos esti malrapida, sed se oni povos tute forigi la timon pri nova milito, la penso de la homoj sin direktos for de la negativa ĉefokupo—la defendisma sinteno pri militpreparado—al pozitiva kaj konstrua idealo de konstruo de bonaj kaj najbarecaj rilatoj kaj kunlaborado laŭ manieroj, kiuj havos komunan utilon. Kiel rapide tio okazos kaj kiamaniere ĝi sin montros, ni ankoraŭ ne povas antaŭvidi, sed ĝia neevitebleco apenaŭ povas esti problemo. Tial ke la mondo ankoraŭ neniam konas tian gradon de sekureco post interkomunikiĝoj plifaciliĝis, senekzempla oportuneco sin prezentas por internacia alproksimiĝoj. Ĉio tio signifas pli ĝeneralan lernadon de internacia lingvo. Kiel oni povas ekkoni la homojn ĉe la proksima pordo, se unu ne konas la lingvo de la alia, kaj kiel oni povas pruntepreni iom da lakto aŭ panbulon per mangestado? Se demokrateco havos signifon, la popolo devos regi ne nur per siaj elektitaj reprezentantoj, sed ĝi devos doni gvidon kaj impulsojn al internacia politiko. Ne sufiĉos plu, ke niaj ŝtatistoj kaj diplomatoj povu (kiel oni esperas, ke ili tiam povos) paroli senpere al ŝtatistoj kaj diplomatoj en fremdaj landoj; tia kontakto devas esti ebla por la ĝenerala publiko, kiu vojaĝos kaj kiu renkontos fremdajn turistojn hejme. Ili ne devos kontentiĝi dum eksterlandaj vizitoj per rigardo al la aspekto de lando, per gvidado de iu interpretisto ĉirkaŭ urbojn; ili devas havi la eblecon senpere ĉirkaŭmigri, fari iujn ajn demandojn kiuj venas en la menson,

partopreni en diskutoj, argumenti, amike admoni, kaj se necese, disputi kaj eĉ kvereli. Nenio alia kontentigos.

En ĝeneralaj internaciaj rilatoj helplingvo estus inter la plej potencaj rimedoj por progresigi internacian pacon. Tio ne nur helpus al homoj de diversaj landoj ekkoni unuj la aliajn, sed per pli pozitiva kaj konstrua maniero, naciismo estus nuligata kaj la internacia epoko, la *mondepoko* ekkomenciĝus. Kun la ĝenerala uzo de unu lingvo, la sento de komuna membreco de la mondfamilio ne povos malhavi la sugestion de kresko; kaj fine, estas ĉi tiu pozitiva sento, prefere ol tiaj negativaj planoj kiaj malarmado, internacia polico kaj la malpermeso pri konstruo de submarŝipoj aŭ bombprodukto, kiu alportos la deziran rezulton. Oni povas forte aserti, ke alpreno de helplingvo estas unu el la ĉefaj rimedoj de maturigo de popoloj en la mondo. Aviadiloj tute ŝanĝis ĉiun aspekton de la internacia vivo, kaj la enkonduko de Esperanto alportos universalan interkompreniĝon percepteble pli proksimen.

D-ro A. Mildwurf, Londono

Neĝa Ŝtormo

La ŝtormo horizontale preterblovegis neĝerojn kaj hajlerojn kiel fantoman vualon. Mi batalis kontraŭ la ventegon. Mi preskaŭ tute fermis miajn palpebrojn kaj vidis maksimume en distanco de dek paŝoj. Mia vizaĝo ardis. Mi estis en malliberejo kun nevideblaj muroj.

La ŝtormo rapidegis, kriegis, ĝemis kaj furiozis. Senkompate ĝi skuegis miajn vestojn kaj blovis malvarmon tra la ŝtofo ĝis la haŭto. La spiron ĝi tiregis de mia buŝo. Mi paŝadis jam plurajn horojn tra ĉi tiu blanka infero. Pene kaj malrapide, mi tiradis miajn skiojn tra la neĝamasoj altaj ĝis miaj genuoj. Mia rezerva rimeno falis en la neĝon. Ĝi restis tie. Mi ne povis klini min ĉar mi estis tro rigida. Mi eksentis malsaton. En mia dorsosako estis manĝaĵoj, sed mi ne volis depreni la portajon de la ŝultroj; mi estis tro malvigla kaj indiferenta. Sed mi devis plu iri tiel longatempe kiel mi povis. Vivado estas movado.

Miaj okuloj fine alkutimiĝis al la fluganta neĝo, la oreloj al la potenca kantado kaj orgenado de la ŝtormo. La monton ĉirkaŭis gigantaj fortoj. La muĝo de la urugano estis la dia voĉo. Mi, homo, estis tre malgranda kaj malgrava en ĉi tiu terura soleco. Subite, mi malsuprenglitis deklivon kaj falegis en profundan, molan neĝamason. Tie ĉi ne estis ventego; tie ĉi mi

volis fermi la okulojn kaj ripozi, resti, nur kelkajn minutojn resti. Mi estis tro laca. Diablo prenu la batalon kontraŭ la glacia urugano!

Sed mi kuraĝigis min kaj vigligis min. Insultante mi eligis min el la alloganta mortlito kaj skiadis pluen. Denove, mi klinis min kontraŭ la glaciajn grajnoj. Ankaŭ miaj pensoj vigliĝis, eble kaŭze de la falego, kaj ekflugis kiel fortimigitaj birdoj. Granda estas la universo, granda la tero, granda estas ĉi tiu alpo, alie mi, mallerta homo, ne tiom longe erarvagadus. Kio estas homo, mezurita laŭ neĝostormo? Tremanta mikrobo, ja baraktanta mikrobo.

Tiu ĉi sur la skioj ekzemple denove agas tute vigle. Ĝi ne volas subigi. Ĉu ĝi trovis spuron, laŭŝajne?

Mi sekvis bonhumore la skispuron kaj kredis min savita, ĝis mi trovis mian perditan rezervrimenon, kaj rimarkis ke mi sekvis mian propran spuron. Apatie, mi plu paŝadis ĉar miaj gamboj kaj brakoj jam estis svingigantaj. Se el la blanka nenio iufoje roko aŭ stango estus videbla!

Mi jam ne kuraĝis pensi pri la rifuĝejo, kaj ankaŭ ne pri tio, ke en la valo ekzistas homoj, lumo, varmo, vivo.

Krepuskis. Mi konsciis, ke sekvante mian spuron, mi venos returne al la senventa kavaĵo, ke mi rondiras, ke mi devos serĉi novan vojon, alie mi ne trovos savon kaj celon. Mi tamen iris la malnovan vojon returne, ĉar mi volis ripozi kelkajn minutojn en tiu kavaĵo. Mi konsciis, ke la nevidebla malamiko intencas subigi min. Miaj piedoj fariĝis buloj sen senkapablo. Mi vadis pluen tra la alta neĝo. Mi denove glitis malsupren la deklivon. Tie ĉi mi volis eksidi. Tie ĉi ne estis ŝtormo. Noktiĝis. Mi meditis, kio okazos? Mi konsciis, ke mi nun troviĝas proksime de la eternulo, de tiu potenculo, kiu estas direktinta ĉiujn miajn paŝojn ek de la unua infana iretado ĝis la hezita vagado en ĉi tiu nokto. Mi jam volis ekdormi kaj sonĝi pri la transejo. Antaŭ ol definitive fermi la okulojn, mi vidis ekbrili ruĝan stelon, signalon, kiun eklumigis la estro de la rifuĝejo. Dum la neĝo-ŝtormo, mi estis rondirinta ĉirkaŭ la kabanon.

Karlo Gerber, Germanujo

Kolektantoj helpu Esperantigi!

Esperantistoj, kiuj havas intereson pri kolektado de poŝtmarkoj, almet-etikedoj, *ex libris* k.t.p., bonvolu skribi Esperantlingve kaj petu aliĝkondiĉon en Internationella Samlareförbundet Skandia, Eriksgratan 32 A, Stockholm, Svedujo.

ENIGMA KONKURSO N-ro 16

Solvajn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo

Solvaj de la enigmoj en Konkurs N-ro 14

N-ro 32: *Horizontale:* Maria kaj la Grupo, magnet, aliulo, tio, ajn, sin, la, akuta, ve, ulo, ananaso, pin, te, brod, nodo, as, bet, omo, ora, klav, neta, seb, ink, par, ag, lern, larm, mi, tag, deklami, mis, il, glaso, am, acu, iri, alt, ekpren, kolera, Stranga Heredaĵo.

Vertikale: am, rat, igis, ano, ke, atakado, lantano, al, gis, ruin, uln, po, plutokratio, jun, sensualismo, ale, ano, aso, via, art, odo, bevel, ornam, bas, min, aer, bed, inklina, klasike, pri, gal, reg, amo, mia, lar, sepa, sled, akr, urn, ale, tra, et, eg, ke, aj.

N-ro 33: piedo – piemo – premo – pramo – bramo – brako. verda – verma – ferma – firma – fiam – tiama – tiara – tigma – nigra. pruno – pruvo – pravo – pramo – framo – frago. ligno – liano – piano – plano – plato – pleto – poeto – porto – parto – karto – karbo. marto – malto – multo – kulto – kulio – julio. plori – ploro – ploto – pleto – poeto – ponto – konto – kanto – kanti.

N-ro 34: La 15-an tagon la foliaro de unu planto kovras la tutan surfacon de la akvo, la 14-an tagon la duonon, kaj la 13-an tagon la kvaronon de la surfaco. Tiam kvar plantoj do kovras la tutan surfacon.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la dekdua konkurso: F-ino W. M. Millenaar (Ned.) 83p, F-ino N. Hanson (Brit.) 78p, S-ro P. Brunet (Franc.) 75p. Sekvas post ili: S-ro W. J. A. Manders 70, S-ro D. W. Robson 69, S-ro F. Taylor 66, S-ro H. de Kuyser 65, F-ino E. Jayet 65, S-ro H. Westergaard 64, S-ro P. E. Schwerin 64, S-ro J. Yben 62, S-ro Fr. Couwenberg 61, S-ro R. V. Salles 60.

Enigmo N-ro 38: La tuto konsistas el 53 literoj kaj esprimas la starpunkton de D-ro Zamenhof koncerne lian verkon. La komenca literoj de la serĉotaj vortoj formas konatan esprimon.

14-8-23-46-20 ĥemia elemento; 13-41-19-1-29 mallarĝa terkolo inter du maroj; 35-5-43-21-49 fortege deziranta ion; 15-17-45-27-53 cirkloforma peco el malmola materio; 4-26-32-48-25 deziri havi tion, kion alia posedas; 27-7-8-37-6 frukto de arbo; 35-30-44-14-33 amata persono; 3-10-41-28-51 restadejo; 12-16-50-52-6 sovaĝa birdo; 20-18-14-24-29 parenco; 42-22-15-3-2 spasme elspiri aeron; 48-18-19-40-39 prepozicio; 49-47-4-52-33 arbo; 9-5-10-26-2 perdi la konscion; 16-27-31-21-53 ŝildo de la Greka diino Palaso; 15-38-11-42-51 fera oksido;

32-8-34-36-6 danco; 35-9-12-30-33 spirmal-sano; 45-38-50-39-43 manĝigi; 42-46-37-22-51 malgranda papilio; 29-1-49-52-20 markustulo.

Enigmo N-ro 39: Ĉevalira enigmo. Pere de la ĉevalirado en la ŝakludo formu el la literoj de ĉi tiu figuro esprimon, kiu troviĝas en la proverbaro de D-ro Zamenhof. La substrekitaj literoj estas la komencliteroj.

Sendita de S-ino C.M.E. den Hollander-Mighorst (Ned.)

N	S	N	L	E	D	B
N	O	N	A	O	U	N
L	I	D	K	O	A	I
A	E	R		V	O	N
A	I	<u>E</u>	M	F	S	R
V	E	N	I	D	I	R
G	N	I	N	E	T	A

Enigmo N-ro 40: La sinjoroj Anglo, Franco, Svedo, Dano kaj Polo kelkfoje renkontiĝis dum Esperanto-kongresoj kaj interamikiĝis. Dum la lasta kongreso en Bern ili ree estis kune. Ĉiuj kvin estis lingvo-instruistoj, kaj instruis po du el la lingvoj Angla, Franca, Sveda, Dano kaj Pola, tamen neniu instruis la lingvon, kies nomon li havas. Cetere, ni scias, ke: 1. S-ro Dano okupis ĉambron inter tiuj de la instruistoj de Angla lingvo; 2. S-ro Polo edziĝis al la fratino de unu el la instruistoj de Sveda lingvo, kaj ke lia propra fratino edzinigis al la alia instruisto de Sveda lingvo; 3. S-ro Anglo ne sciis la Francan lingvon; 4. S-ro Franco ne sciis la Polan lingvon; 5. S-ro Svedo faris kun la instruisto de la Dana lingvo la ekskurson al la Jungfraŭ; 6. Vespere, la instruistoj de Franca kaj Sveda lingvoj ofte kvarope karthludis; 7. La sinjoroj Dano kaj Polo instruis unu saman lingvon; 8. La Franca lingvo ne estis instruata de iu, kiu havis la nomon de la lingvoj, kiujn S-ro Franco instruis. Kiujn lingvojn respektive instruis tiuj sinjoroj?

5 poentoj por ĉiu korekta solvo

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO kaj UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 194

7an de Majo 1947

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstrujo

Graz. D : A. Podrepschek, Sackstrasse 16/I, Graz I.
Tel : 83-0-00/487.
VD : J. Eder, Stattegg-Eichberg 72; Graz-St. Veit.
FD (Tekulturo; Fruktarbokulturo) : La VD.
Klagenfurt. VD : F. Casar, Brunaplatz 3.

Brazilo

Baurú. FD (Fervojoj) : S. Paiva, a/c V. Romano, Batista Carvalho 5.50.
FD (Radio; Ŝako) : A. Mosterio, Rua Celia 1.37.
FD (Tajloraj aferoj) : V. Romano, Rua Batista de Carvalho 5.50.
Belo Horizonte. FD (Bankaj aferoj) : I. Borges Horta, Rua Gonçalves Dias 92.
FD (Evangeliismo) : J. Vieira Campos, Banco Mineiro da Produção S.A., Caixa postal 300.
FD (Odontologio) : F.ino H. Kiss, Rua Tamoios 62, Sala 101-1.
FD (Spiritismo) : A. K. Afonso Costa, Banco do Brasil.
Caraguatatuba. FD (Migrado) : S.ino E. Linz, Caraguatatuba, Est. S. Paulo.
Sao Paulo. FD (Radio) : L. B. Fosca, Rua José Bonifacio 233-S 8/802. Tel : 2-28-63.

Britujo

Leeds. FD (Biciklado; Fotografado) : A. B. Clarke, 124 Middleton Park Avenue, Leeds 10.
London. FD (Krenacio) : F. Thurgood, 17 Winchester St., London, S.W.1.

Ĉeĥoslovakujo

Česká Lipa. D : J. Hanuš, Kožnarova str. 1279.
Praha. FD (Kristanismo) : D-ro M. Novák, Vuchterlova 5, Praha XIX.
FD (Psikologio) : Z. Tubl, Přístavní 27, Praha VII.
Tel : 0000/544.
Veselí nad Mor. FD (Komerco) : J. Pavlacký.

Danujo

Holbaek. FD (Bankaj aferoj; Sporto) : K. Pedersen, Chr. Hansenvej 4.

Finnlando

Helsinki. FD (Ŝako) : K. A. Lehto, Laivanvarustaj-ankatu Sa, A 1.

Francujo

Bailleul. D : Jean Deleury, Bailleul-sire-Berthoult (Pas-de-Calais).
Bischwiller. D : F. P. Kiehl, Rue de l'Eglise 10, Bischwiller (Bas-Rhin).
Lyon. FD (Infanedukado) : F.ino J. Billiemaz, 69 Rue des Sablonniers.
FD (Kontoj; Juro) : L. Perret, 106 Cours Docteur-Long, Lyon 3. Tel : V 70-19.
FD (Polico) : R. Lafontaine, Aéroport de Bron (Rhône).
FD (P.T.T.) : P. Dehan, 2 rue Philibert Delorme, Lyon I.
Nantes. FD (Farmacio) : J. Praud, 28 rue de La Rosière d'Artois. Tel : 329-09.
Strasbourg. D : F. Zipfel, 20 rue Labroque.

Hungarujo

Cegléd. D : J. Szunyogh, Összekötő 431, Cegléd X.

Italujo

Monza. D : D-ro A. Giorgi, Via Stelvio 1.
Torino. FD (Kristanismo) : N. Rosso, Via Frossasco 9.

Jugoslavujo

Bjelovar. FD (Laboristaj aferoj) : S. Maltar, Radićev trg 4.
Novi-Sad. FD (Filatelo; Ĵurnalismo) : M. M. Damjanović, Kisačka ul. 20.

Maroko

Casablanca. FD (Flegado) : J. Etienne, Onzième Section des Infirmiers Militaires.

Nederlando

Tilburg. FD (Ekonomio; Politiko) : W. J. H. Derks, Leenherenstraat 24.

Norvegujo

Leknes i Lofoten. D : Johan. Bøe.
Oslo. VD : S. Brantsæter, Stockflethsgt. 53 B II.
Tel : 422202.
VD : A. Hasle, c/o Stokstad, Harald Hårfagresgt. 12 D III.
FD (Bibliotekoj; Filatelo) : F.ino A. Lindaas, Gjørstadsst. 8. Tel : 466424.
FD (Kontraŭalkoholismo) : F. Torvik, c/o Olsen, Stensgt. 22 B IV.
FD (Studentaj aferoj) : J. H. Rosbach, Hoffchef Lovenskiolds vei 32, Bestum. Tel : 559925.

Portugallujo

Aljustrel. FD (Literaturo) : A. Costa Soares, Rua Branco Rodrigues.

Rumanujo

Târgu-Mures. D : S.ino T. Barabás, Strada Malinovsky 149. Tel : 110.

Svedujo

Malmö. VD : S.ino E. Andrén, Lycebogatan 22, Kulladal. Tel : 14611.
FD (Farmacio) : H. Andersson, Ekgatan 55, Hindby.
FD (Urbaj aferoj) : H. Andrén, Lycebogatan 22, Kulladal. Tel : 14611.

PATRONOJ 1947

21. S-ro N. Wooding, Leicester, Anglujo.
22. S-ro N. Nielsen, Thorshavn, Farøerne, Danujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

251. S-ro A. Strauch, Bad Pyrmont, Germanujo.
252. S-ro H. Huisjes, Jr., Gasselternijveen, Nederlando.
253. S-ro G. J. D. Dijkstra-Bral, Terneuzen, Nederlando.
254. S-ro A. Cseh, Den Haag, Nederlando.
255. S-ro A. Spohler, Bremen, Germanujo.
256. D-ro H. Wehrheim, Hildesheim, Germanujo.
257. S-ro T. C. Baillie, Workop, Anglujo.
258. F.ino K. Walden, Ystad, Svedujo.
259. S-ro E. Malmgren, Stockholm, Svedujo.
260. S-ro B. Sadowski, Warszawa, Polujo.
261. S-ro F. Helfers, Karlsruhe, Germanujo.
262. S-ro M. Bolsius, Antwerpen, Belgujo.
263. S-ro H. Daliher, L'Isle Jourdain, Francujo.

DONACOJ—L. G. Livett 12\$, D. kaj J. Kreutzer 5\$, J. Course 1\$. 9p.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo : A. Robb 20\$, F. Thurgood 5\$, J. W. Chambers 10\$, T. J. Gueritte 12\$.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Jarlibro—La jarlibro estas nun tute kompostita kaj la preĝe atendas liveron de la papero. Tuj post ricevo oni presos ĝin, kaj dissendos ĝin.

Voĉdonado kaj elekto: Ni informas la Delegitojn de IEL kaj UEA ke estas dissendataj je la 6a kaj 12a de Majo 1947 la dokumentoj por la elekto de la Komitatanoj, kategorio B, kun la Oficiala Bulteno n-ro 20. Estas la statuta devo de ĉiu Delegito partopreni ĉi tiun voĉdonadon.

Nova Statuto: Voĉdoniloj estas senditaj al la Landaj Asocioj pri nova statuto rezulte de la kunfandiĝo. Oni anoncos la rezulton en la Kongreso en Bern.

GRAVE!

Dum la kongresa periodo la Sekretario ne deĵoros en Rickmansworth. Oni do bonvolu klopodi, ke korespondadoj ne atingos la Oficejon dum tiu tempo. Antaŭdankon.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 30a Aprilo 1947, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1946:

	1946	1947
Asociaj membroj ..	4568	5412
Individuaj membroj:		
MJ	764	822
MA	3258	4305
MS	224	260
Patronoj ..	23	22
DM	94	110
HM	20	20
	4383	5539
	8951	10951

CECIL C. GOLDSMITH,
Sekretario.

NASKIĜOJ

Hasper—Al Ge-sroj H. Hasper, en Haulerwijk, Nederlando, naskiĝis je la 18a Aprilo, filo, Renze Piet.

Withoos—Al Ge-sroj A. W. Withoos, en Eindhoven, Nederlando, naskiĝis je la 4a Aprilo, filino, Marjan.

NIAJ MORTINTOJ

Kun profunda bedaŭro ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni esprimas nian sinceran kondolencan.

Collier—Je la 18a Aprilo 1947 forpasis S-ino B. S. Collier, Birmingham, Anglujo. Dum pli ol 20 jaroj ŝi fervore laboris por nia Movado.

McKay—Je la 3a Oktobro 1946 forpasis nia Delegito en Bowen, Queensland, Aŭstralio, S-ro Moray C. McKay.

Roscoe—Je la 20a Aprilo 1947 forpasis S-ro N. K. Roscoe, Ruislip, Anglujo, Dumviva Membro.

Interesa Okazaĵo

En la Februara (1947) numero de *Esperanto Internacia* ni presigis fotografajn de regionkunveno en Ostrava. Post iom da tempo la Ostrava-klubo ricevis du leterojn. Sur la koverto oni gluis la eltrancitan fotografajn kaj indikis per streketo iun fraŭlinon, kaj petis korespondadon. La leteroj atingis la koncernen fraŭlinon.

Lokaj gazetoj publikigis la leterojn kaj artikolon, kiuj vekis multe da intereso en la urbo, kaj faris bonan propagandon.

LA PETSKRIBO

La deklarfolioj daŭre enfluas en la oficejon sed sekve de la tre multa laboro, kiun lastatempe kaŭzis la kunfandiĝo de la asocioj, ni devis iom malatenti ĉi tiun fakon, kaj ĉe ni kuŝas pluraj miloj da subskriboj ankoraŭ ne registritaj. Ni tamen petas, ke niaj kunlaborantoj ne ĉesu kolektadi, ĉar en oportuna tempo ni klopodos pri ili, kaj la lastatempe alvenintaj estos montrataj en baldaŭaj ciferoj.

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 8-a de Majo:

Landoj

Nederlando ..	46621	Germanujo ..	3452
Britujo ..	24544	Portugalujo ..	3423
Francujo ..	23257	Aŭstralio ..	3011
Bulgarujo ..	21461	Nov-Zelando ..	2495
Ĉeĥoslovakujo ..	18086	Italujo ..	2204
Svedujo ..	16518	Egiptujo ..	1761
Norvegujo ..	12724	Svisujo ..	1583
Jugoslavujo ..	11740	Maroko ..	1033
Danujo ..	7305	Palestino ..	485
Aŭstrujo ..	7064	Grekujo ..	473
Polujo ..	7041	Urugvajo ..	460
Finnujo ..	6325	Irlando ..	449
Argentino ..	5370	Kanado ..	300
Belgujo ..	5216	Hispanujo ..	274
Usono ..	4681	Ceteraj lokoj ..	661
Brazilo ..	4129		
Islando ..	4065	sumo ..	251800
Hungarujo ..	3589		

Okupoj

Artistoj ..	1504	Navigaciistoj ..	914
Delegitoj Komunumaj	387	Parlamentanoj ..	147
Dentistoj ..	402	Policistoj ..	1614
Desegnistoj ..	1654	Presistoj ..	2497
Dommastrinoj ..	35033	P.T.T.-istoj ..	5384
Edukaj Aŭtoritatuloj	930	Religiistoj ..	1195
Elektristoj ..	2084	Sciencistoj ..	929
Farmaciistoj ..	958	Sindikateŝejoj ..	341
Farmistoj ..	7996	Soldatoj ..	2857
Hotelistoj ..	1258	Studentoj ..	22820
Inĝenieroj ..	9618	Ŝoforoj ..	1814
Instruistoj ..	14043	Ŝtatoŝciistoj ..	6172
Juristoj ..	1197	Teknistoj ..	1141
Ĵurnalistoj ..	887	Transportistoj ..	11478
Komercistoj ..	42946	Urboŝciistoj ..	2930
Konstruistoj ..	4710	Vendistoj ..	7624
Kuracistoj ..	3363	Vestitoj ..	4462
Laboristoj ..	15963	Diversaj ..	14491
Lingvistoj ..	207		
Metiistoj Diversaj	17850	sumo ..	251800

Internacia Semajno en Zaandam

Okaze de la 35-a datreveno de la fondo de la grupo *Antaŭen* en Zaandam, Nederlando, oni aranĝos en Septembro Internacian Semajnon kun aktiva apogo de la urbaj aŭtoritatoj. Tre multaj eksterlandaj samideanoj kaj eminentuloj ricevis inviton partopreni, kaj la afero certe estos granda manifesto de la praktika efiko de lingvo internacia.

Oni sendu grandnombre salutojn al Komitatano A. Hazen, Beukenlaan 12, Zaandam, Nederlando.

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de Esperanto*.

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta ; la lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto ... la frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon ... La rezulto estas libro pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla ..." —*Esperanto Internacia*.

531 paĝoj, 19 × 14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,
tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe I.E.L.

Vian VARBILON por Esperanto

efikplenaj varbstampiloj

adresstampilo kun E-stelo
kaj verda stampilkuseno

kliŝoj por ĉiuj presaĵoj

lumbildoj por varbado en
filmteatroj

mendu ĉe

Waldemar Reinhold

ESPERANTO-VARBILOJ

(22a) Duisburg, Germanujo

Johanniterstrasse 84

POSTULU SENPAGAN KATALOGON !

AFRIKA REVUO

Esperanto gazeto por ĉiuj

enhavas tre interesajn artikolojn pri Esp. movado, socia vivo, literaturaĵoj, poezio, paĝon por komencantoj, konkursojn, humorajojn, k.t.p.

Abonkotizo por tuta jaro : 15 internaciaj poŝtaj respondkuponoj sendeblaj al Redakcio de Afrika Revuo, 5 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko.

Abonon (6 ŝil.) akceptas ankaŭ la Centra Oficejo de I.E.L.

KORESPONDEMULOJ

ekster Anglujo povas senpage trovi korespondantojn pri ĉiuj temoj. Sendu informon pri deziroj al I.F.L. Correspondence Bureau, International Centre, 83 Suffolk Street, Birmingham, Anglujo.

Ĉenleteroj ne dezirataj. Lingvoj uzataj : angla, franca, germana, kaj Esperanta. Ne forgesu mencion de "Esperanto".

GRAFOLOGA KONSILADO

(karakter- kaj kapableco-diagnozo laŭ la manskribo) por industrio kaj firmoj (okupoj de laborejoj, kompanianecoj), animkuracistoj, profesielekto, edziĝo, amikeco, eduko, kaj propraj animaj konfliktoj.

Detalajn informojn de

**D-ro Horst Bitterling, (20b) Göttingen,
Schillerstr. 66, Brit. Zone, Germanujo.**

ELDONITAJ DE ESPERO KATOLIKA

FABIOLA. (Rakonto pri la katakomboj). KARDINALO WISEMAN.

El la angla lingvo tradukis E. RAMO.

Bindita, 436 paĝoj. Prezo 15s., afranko 9p.

KAPTITAJ EN NUBIO. HENRYK SIENKIEWICZ.

Esperantigita de FRATO WIGBERTUS VAN ZON.

Broŝ. 120 paĝoj. Prezo 3s., afranko 4p.

KLARI. MYRIAM CATALANY.

El franca lingvo tradukis EM. ROBERT.

Broŝ. 136 paĝoj. Prezo 3s., afranko 3p.

LA ORIGINO DE LA RELIGIO. Originale verkis JOS. SCHMIDT.

Broŝ. 32 paĝoj. Prezo 1s., afranko 1p. (4 rpk.)

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ideala Esperanto - Biblioteko

La jenaj numeroj estas nun haveblaj :

La Morea Perlo. D. Simson.

El la nederlanda lingvo tradukis R. Delpasko. 223 paĝoj.

Irisiŝ. Henry 't Sas.

El la nederlanda lingvo tradukis P. van de Vijver. 194 paĝoj.

Sub la Vitra Kupolo. V. L. van Weddingen.

El la nederlanda lingvo tradukis M. Groels. 160 paĝoj.

La Radianta Lotuso. J. D. Degreef.

El la nederlanda lingvo tradukis P. van de Vijver. 193 paĝoj.

La libroj estas bele presitaj sur bona papero, kaj ĉiu havas
ilustritan fortan kovrilon.

Prezo por ĉiu libro 2s. 3p., afranko 3p., aŭ 10 internaciaj
respondkuponoj afrankite.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo